# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.eu/kajeroj/k75.html




Nro 75a

Januaro/februaro de 2008

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* ***Juan Antonio Cabezos Martínez,***
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: Jen la Hotelo Pacifiko, ĉefa kongresejo de la 92ª Universala Kongresejo, en Jokohamo, Japanio.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Jorge Pavón,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Vytautas Ŝilas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Enhavo

Redaktore: La ŝuldo ........ 3
Parolas la Prezidanto ........ 4
La deka poemo ........ 5
La Universala kongreso de Japanio ........ 6
Bona ideo ........ 10
Verda Valo ........ 12
Je via sano, samideanoj! ........ 13
Plilongigi vivon ........ 14
Ĝusep' Ĵuis ........ 15
La Faraono, ĉapitroj 20ª kaj 21ª ........ 16



# Redaktore

## La ŝuldo

Lastan jaron aperis nur du numeroj de ***Kajeroj el la Sudo***. Ĉi tiun jaron ni intencas pagi tiun ŝuldon, du numerojn eksterordinarajn, al vi. Por aserti nian kompromison al vi, leganto, ni jam diris en nia kovrilo, ke ĉi tiu numero estas por januaro kaj februaro. Mi esperas veni denove al vi je marto kun nova kajero, la numero 76ª, kun novaj interesaj artikoloj, kiuj eĥu la realon de Hispanio kaj de la mondo per aŭ pri Esperanto.

Lastan jaron okazis Universala Kongreso kaj ankaŭ la Konferenco de ILEI en Japanio. Mi ĉeestis ambaŭ aferojn, kaj vi legos pri ili du en la venontaj paĝoj.

Mi devas pardonpeti pro mia eraro, ĉar lastnumere mi dankis la kunlaboradon de la bulteno ***Boletín***, de *Manuel Pankorbo*. Tio estis eraro, ĉar ĝin redaktas de antaŭ kelkaj numeroj **Jorge Pavón**.

Elkore salutas,

*Jesuo*



**Jen la granda rado de Jokohamo, kiun mi fotis lastan someron tra la fenestro de la kongresejo.**

# Parolas la Prezidanto

Estimataj GeHALEanoj!



Dum ĉi tiu nova jaro ni havos kongresojn en Nederlando kaj alia lokoj. Ĉiu esperantisto devus aliĝi al la kongreso de Nederlando, ĉar ni havos novan ŝancon paroli en Esperanto.

Aliflanke, en Nederlando estas la sidejo de UEA, nia granda organizaĵo, kaj ni havos la eblecon viziti la sidejon de UEA, viziti la bibliotekon de UEA, viziti la domon de UEA.

La esperantistaro ŝatas vojaĝi , ŝatas koni aliajn landojn, kaj tial multaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne konas la hejmon de UEA — mi estas unu el ili,— povos tion fari, ĉar nia mono kaj libertempo kutime dediĉiĝas al vizito de aliaj landoj.

La lasta kongreso de la renkontiĝo de la esperantista popolo estis en Japanio, lando, mirinda lando, kiu organizis grandan kongreson.


Mi bedaŭras ke mi ne partoprenis la kongreson, kvankam mi aliĝis al ĝi, sed alia persona de nia revuo, Jesuo de las Heras, partoprenis.

Denove mi diras: la esperantistoj devas aliĝi, almenaŭ, al la kongreso ĉiujara de UEA.

En la venonta numero mi parolos pri la aktuala diktaturo de la kreduloj, ĉu dekstraj, ĉu maldekstraj.

*Johano Cabezos,*
*Prezidanto de HALE*





# La deka poemo

1. Mi volus iri kun vi, vagabondo,
Mi volus iri kun vi tra la mondo,
Mi volus brui, petoli, ĝui kaj boli.
Vivi artiste, vivi vagiste en plena forgeso,
sub minuta impreso.

2 Sed tro longe fermita en kaĝo
sensukiĝis mi antaŭ la aĝo!
pro la gajaj viaj rondoj, amikoj vagabondoj
mi nun ne plu taŭgas.

3 Pasie mi ĉiam amis la vivon,
sed ĝin mi neniam ĝuis reale;
konstante, revante, mi spiris kaj diris:
Paciencu hodiaŭ, morgaŭ vi vivos!
Atendu, atendu, al la vivo mi vokis!
Sed la vivo nur kuris kaj mokis..!

4. Kantis la birdoj, mi ilin ne aŭdos
lumis la sun´, mi ĝin ne admiris:
Printempaj riveroj , majaj vesperoj
ne sentite, ne uzite, ĉio foriris...
5. Feliĉa vi estas, artisto libera
se vin zorgoj kaj devoj ne premas al tero,
se vin muroj ne fermas, ne alforĝas al tablo,
via volo vin gvidas kaj via kapablo.
Ekzistas multe da belo sub la bela ĉielo:
Ĝuu ĝin, miru ĝin, sentu ĝin, spiru ĝin
Por vivantaj ekzistas la vivo.

6. Ne perdu la vivon serĉante plezuron,
sed konservu en ĉio la ĝusta mezuron,
ne uze malpure natura la domon
per la belo vi semu la bonon!

L.L. Zamenhof

# La UK de Japanio



Je la 4-a de aŭgusto ĝis la 11-a mi konis Japanion . Sur tiuj ĉi linioj oni povas vidi la halon de la ĉefa kongresejo, ĵus antaŭ la solena malfermo.

Mi venis en Japanion ne el Hispanio, sed rekte el Britio, kie mi devis fari kelkajn aferojn; kaj eble pro tio la diferenco, kiun mi trovis, ne estis tiom ŝoka, kiel mi esperis. Dekomence, japanoj ankaŭ stiras laŭ la maldekstra flanko de la ŝoseo. Ankaŭ ili estas mallaŭtaj, same kiel la kutimaj britoj, kaj ankaŭ ili estas ĝentilaj.

Sed male al la britoj, ili parolas tion, kion mi ne komprenas. Eĉ kiam ili parolas la anglan. Feliĉe, ilia Esperanto estas tute klara kaj bela, se vere laŭ la homo, same kiel inter ni.

Pro tio min ŝokis la fakto, ke la Kongreso Temo estis prezentita japane, ne esperante. Kial? Ne, mi ankoraŭ ne komprenas tion.

La Kongresa temo estis ***Okcidento en Oriento, akcepto kaj rezisto.*** La konkludo estis, ke Oriento uzas okcidentan kulturon por rezisti Okcidenton, tio estas, la okcidentajn povojn. Okcidenton oni prenas kiel Eŭropon, laŭ mia kompreno. Mi ne povis ne demandi al apuda japano, *Kio estas Eŭropo?, kiaj estas eŭropanoj?* La japano mire rigardadis min, kvazaŭ mi ekfreneziĝas. Eĉ pli kiam mi asertis, ke dum mia tuta vivo mi ne konis eĉ unu *eŭropanon*, kaj aldone dum miaj vojaĝoj tra la diversaj landoj de Eŭropo, mi ĉiam trovis, ke Eŭropo estas *la aliaj landoj* krom tiu, kie mi estis. Tio signifas, ke mi ne estis

eŭropano en Hispanio, sed kiam mi vizitis Britiοn, Francion, Germanion, ne ili, sed mi estis la eŭropano. Estus same kiel, parolante al japano, koreo kaj ĉino, mi konkludus ion pri *vi, azianoj*.

Sed kial *rezisto*? Eble respondo estas en la prelego de Tsuda Yukio, *Fakto estas Okcidento super Oriento*, publikigita ĉe la unua paĝo de la Kongresa Kuriero, ***Ondas Jokohamo 5-a***, de la 9-a de aŭgusto, kiam li asertas, ke *Okcidentanoj evoluigis sciencon kaj teknikon, invadis la tutan mondon, kaj asertas, ke la tuta mondo iĝu okcidenta. [...] Oriento devis akcepti Okcidenton. Tia okcidentigo okazis en la tuta mondo dum la lastaj 500 jaroj. Moderniĝo fakte signifas okcidentiĝon de la tuta mondo.*

Al mia menso venas kelkaj gravaj eventoj de la *universala* historio, kiuj ŝajnas kontraŭdiri tiun tezon: unue, okcidenta civilizo vere ne ekzistas per si mem, sed ekzistas algluaĵo, granda monto da individuaj eltrovaĵoj kaj adoptaĵoj en la diversajn kulturojn de Eŭropo, jes, kies *indekson* aŭ resumon oni povas trovi en tiu de Usono, ĉar ĝi vere estas miksaĵo da kulturoj ne nur de Eŭropo, se vere kerne kaj origine ili ĉiuj venis de nia malnova kontinento. Eĉ se permilite oni provis trudi kulturon, religion, civilizon laŭ la historio de Eŭropo de kelkaj landoj kontraŭ aliaj, oni ne povas diri, ke iu ajn venkis. Ni pensu pri la *Milito de la Cent Jaroj*, aŭ la militoj de Karolo la 5-a de Germanio kaj 1-a de Hispanio kontraŭ protestantoj, la rolo de Britio en la diversaj militoj eneŭropaj, tiuj militoj de Napoleon', celante trudi sian revolucion francan laŭ la tuta kontinento, kaj ĉies malvenko tiucele. Ne, la rezulto estis ĉiam interkonsente: demokratio aperis en Eŭropo, sed bazite ne pli sur la ideoj reviziismaj de liberpensuloj francaj,




**Aero, akvo kaj ferbetono en Jokohamo**



tempoj, sed ni ne konservas iliajn lingvojn aŭ aliajn kulturerojn, krom kelkajn loknomojn. Pri la homoj mem, ili estis tiom multe miksitaj kun tiutempaj romianoj, ke oni ne plu povas eĉ certiĝi pri etnaj trajtoj. Nu, ĉu tio okazis en Japanio pro la *usona invado*? Ĉu vere usonanoj devigis japanojn vesti *usoneske*? Eble

sed ankaŭ sur la tradicio brita ekde la *Carta Magna*[1] je la milducentaj jaroj; sed, ni ne povas silenti, unuafoje vortumita je 1776, en Usono. Ĝi ne venis el la ĉielo usona, sed ĝi venis per la klopodoj de multe da homoj laŭ homa historio. La *okcidentaj kulturo* kaj *civilizo* neas nenion eksterokcidentan, sed ĝi asertas la proprajn manierojn solvi problemojn kaj konsideri realon, almenaŭ dum ĝi pruviĝas pli efika ol aliaj alternativoj. Ĝi ne estas detruenda nur pro tio, ke ĝi estas nia... Sed pri *invado*, granda vorto, ne okcidento invadis Ĉinion dum la 20ª Jarcento, sed orienta povo. Tiu povo ankaŭ atakis Usonon, kaj per multe da sufero kaj malfacilo tiu ĉi sukcesis venki ĝin. *Vae victis!*, diris romianoj, kaj ili mem pruvis kial ili diris tion, kiam ili venkis alian popolon. Ekzemple, la diversaj kulturoj, kiuj ekzistis en Hispanio antaŭ la romianoj invadis ĝin tute malaperis. Ni konas, ke ili ekzistis, nur pro la rakontoj de romianoj aŭ romianigitoj de tiuj

[1] *Granda Ĉarto*, dokumento subskribita de Johano *Senlanda*, anstataŭreĝo de Anglujo, frato de Rikardo *Koro de Leono*, en Mezepoko, garantiante povon al nobeluloj, kaj deprenante ĝin el reĝo mem, ne plu absoluta monarĥo.

estas pli komforte uzi kimonon ol ĝinzojn, sed mi serioze dubas tion. Eble estas pli bone, ke povo fontu el Imperiestro ol el la popolo mem, kiel proklamas —eĉ se fojfoje troige— la okcidenta sistemo demokrata, sed mi eĉ pli serioze dubas. Mi preferas malbonan demokration ol plej bonan imperiestron..., sed tio povas esti persona antaŭjuĝo, mi konsentas. Tiurilate, mi memoras, ke japano diris al mi iam dum mia restado en lia lando: *oni ne demandas kial en Japanio!*

La mondo mallarĝiĝas pli kaj malpli tre rapide. Ne eblas lerni diversajn sistemojn por iri *de kvartalo al kvartalo*, tio estas, de lando al apuda lando. Do, interkonsenton oni devas trovi. Je la fino de sia prezento de la Kongresa Temo, Tsuda Yukio diras, ke la defio estas *egaligi rilaton inter Oriento kaj Okcidento*, kaj por tio *akcepto ne sufiĉas, pli gravas rezisto*. Ĉu ni rezistu senkiale? Rezisto kompreneble havas kialojn, sed ne rajtiĝas per si mem. Rezistu ni forigon de rajtoj niaj al interkompreno. Tial, defendu ni Es-

peranton, sed ne rezistu ni bonajn ideojn, eĉ se ili venas pere de la angla.

Krom la Kongresa Temo, oni prelegis, spektis kaj ĉefe parolis kaj interrilatis dum tiu magia kongreso de Japanio. Kulturaj kolizioj ja okazis, kiel kutime, eĉ ne ĉiam pace. Mi atestis ŝokan kontraŭstaron inter ĝentila japana reago kaj vulgara bulgara provoko, ekzemple, sekvita de sovaĝa hispana reago. Tamen, mi jam estis sufiĉe plenkreska ne plu kredi, ke esperantistoj estas kvazaŭ anĝeloj, puraj homoj ĉiam pretaj cedi...

Aliflanke mi trovis homojn kiel tiu, kiun ni vidas en suba foto, Alan Bishop, el Aŭstralio, Prezidanto de la Muziko Esperanto Ligo, MEL, okupiĝante pri elektronika klavaro dum ekzercado de la Internacia Koruso, kiu tiom brile performis dum la Kongreso.

En paĝo sepa oni vidas parton de la jokohama haveno, kun altaj konstruaĵoj kaj rado. En paĝo oka la leganto eble surpriziĝas trovi komunan manĝoĉambron de normala restoracio. Nenio speciala pri tio, sed memoro al honto, kiun oni ne sentis rifuzante al simpla esperantisto kunhavi vespermanĝon kune kun oficistoj de UEA kaj lokokanoj. Bedaŭrinda maniero perdi eblan oficiston kaj lokokanon en la estonto...

Dum la kongreso ni uzis kvar kongresejojn: proksime al Hotelo Pacifiko, unua, ni uzis duan en Halo Minato Mirai, trian, Muzikan Halon Gubernian pli ol unu kilometro for, kaj lastan, ZAIM', iomete pli fore, kie okazis malpli formalaj, sed multe pli oftaj artaĵoj. Tiel mi povis ĝui la kortuŝan pianoludadon de Tazima Mayako kaj la koncerton de Asorti. la litovan grupon, kiu publikigis K-Diskojn *Lernejaj Amikoj* kaj *Kongresa Karaokeo.*



# Bona ideo

Mi ĵus venas el tre intresa konferenco de ILEI en Ranzam, Japanio. La temo estis iel ŝokema: *Virina agado en Esperanto.*

Ĉiuj prelegoj temis iel pri virinoj kaj Esperanto. Amuza estis, inter ili, tiu de Renato Korseti, Prezidinto de UEA, kiu grave asertis, ke la unua virino, kiu verkis en Esperanto, estis Ludoviko Zamenhof mem! Mi atendis sencan aŭ almenaŭ amuzan eksplikon pri tio, sed bedaŭrinde nia bona Doktoro Korseti nur parolis pri antaŭjuĝoj, aljuĝante intuicion al virino, kvazaŭ ni, viroj, ne havus tiun kvaliton. Ĉu, sekve, ankaŭ Njuton' estis virino, kiam li intuiciis gravitecon, kaj sekve esploris kaj trovis leĝon pri tio? Ĉu Galileo Galilei estis virino, kiam li intuiciis, ke ne la suno, sed la tero moviĝas?, aŭ Hiparko de Aleksandrio, kiam li mezurigis la tero-radion,intuiciinte, ke ĝi estas ronda? Ĉu, aldone, Kolombo estis virino, kiam li intuiciis, ke oni povas atingi Bharaton okcidente, se nur Ameriko ne estus meze de la vojo?

Sed virinoj ja agis kaj, feliĉe por ni, agas en kaj por Esperanto. De Lidja Zamenhof mem —kiu devis esti viro, ĉar ŝi ne intuiciis, ke ŝi moviĝas el Usono al morto je 1942!— ĝis nuntempaj verkistinoj, kiel Anna Lowenstein kaj Ŝpomenka Ŝtimek.

Pri la unua, mi legis ŝian ***Ŝtona urbo*** kaj en Esperanto kaj en la angla (***The Stone City***), kion mi rekomendas fari por revizii aŭ lerni facile kaj historion kaj la anglan lingvon.




Pri la dua mi ne multe sciis antaŭ ĉi tiu konferenco, sed prelegante ŝi pri la diversaj aŭtorinoj de Esperanto, evidentiĝis al mi la moleco kaj dolĉeco de ŝiaj voĉo kaj maniero paroli. Ti-on oni ricevas ankaŭ legante ŝiajn verkojn.




La konferenco, tamen, ne enhavis nur prelegojn kaj paroladojn. Ankaŭ ni ricevis seminarion pri sorobano, la tradicia maniero kalkuli en Japanio, kiun komputiloj ankoraŭ ne priforgesigis, aŭ la atelieron pri ludoj, farita de Ana Montesinos, aŭ la dancado prizorgata de Wim, aŭ la kantado de Huljan', ne forgesante pri la ekskursoj al Sankta Monto kaj al najbaraj urboj. K suprangule al ĉio estis ĉiama Aida Ĉizikaite, memdirita *policistino*, sed kiu vere agis kiel helpantino, ĉiufoje zorgante pri la programeroj kaj tio, ke ĉiu paroladantoj ne uzu la tempon de la sekvonta.




Resume, se vin strečas la amaso de samideanoj en UK, aŭ se vi deziras ripozi post UK en trankvila loko kun nur kelkdeko da esperantistoj, aŭ se vi deziras serioze pensi pri nia afero..., vi konsideru serioze la eblecon aliĝi al Konferenco de ILEI, ĉu vi partoprenis la UK, ĉu ne. Venontfoje ĝi okazos en Benino, afrika lando kie julio estas vintro. Tamen sufiĉe

proksima al Ekvatoro por ricevi ne malpli ol 20 gradojn centigradajn dum la konferenco. Kiel ni ĉiuj eble scias, Esperanto nun vekiĝas en Afriko, kaj ni devus helpi tiun progreson, interalie ĉar ĝi regresas ĉe ni. Povas esti, ke se ĝi estas definitive lanĉota en Afriko, iam estos afrikanoj tiuj, kiuj denove lanĉos Esperanton en Eŭropo aŭ Ameriko.





Interesa penso venis al mi dum diskutado ĉe la lasta konferenco: ĉu esperantistoj kulpas vere pro la nedisvastigo aŭ la ne sufiĉe granda disvastigo de Esperanto, se oni ne povas postuli el ni, ke ni estu superherooj?

Male, ja sufiĉe granda venko estas, laŭ mi, ke ni sukcesu *doni la torĉon* al venonta generacio de esperantistoj. Se generacio malsukcesas tion fari, Esperanto mortos. Ĉu ni permesos, ke tio okazos? Se via respondo, leganto, estas nea, mi konsilas al vi apogi UEAn kaj ankaŭ apogi ILEIn, la instruistojn de Esperanto. Ambaŭ asocioj



havas gravajn mankojn, certe, kaj eble iam oni sukcesos malhavigi ilin pri tiuj mankoj. Sed.., intertempe, oni ne serĉu miraklojn aŭ postulu kondiĉojn: oni laboru per la iloj, kiujn oni havas, oni modeste fosu sian sulkon, kiel la fama poeto iam diris.




Kaj kiel oni povas apogi UEAn kaj ILEIn? Nu, vere aliĝante ties kongresojn kaj konferencojn. **Eĉ se oni finfine ne povas ĉeesti** ilin. Mono gravas por publikigi niajn librojn kaj aperigi eventojn en Esperanto. Ankaŭ estas alia maniero apogi —kiujn mi jam espertis dufoje persone: **onkligi** esperantistojn, kiuj alimaniere ne povus ĉeesti kongreson. Jes, mi komprenas, ke estas multe da mono, ne ĉiuj povas pagi vojaĝon, kongreskotizon kaj loĝadon kaj manĝadon de esperantisto de malriĉa lando dum la kongreso, ĉefe se ĝi okazas en riĉa lando, kiel kutime; ne ĉiuj povas senhaviĝi pri du aŭ tri mil dolaroj. Sed oni povas kontribui ion, tiel ke inter kelkaj esperantistoj oni povas onkligi unu samideanon ĉeesti UKn aŭ ILEIan konferencon nome sia aŭ de sia grupo.

Ĉar **onkliĝo estas solidareco** inter esperantistoj, kaj **Esperanto estas bona ideo.**

*Narita-Londono,*
*je la 20-21ª de aŭgusto de 2007.*

## Verda Valo

*Verda Valo*, vere dirite Hasegawa Teru, naskiĝis je 1912 kaj mortis je 1947. Ŝi estis poetino, kiu edziniĝis al ĉino kaj migris en Ĉinion ĉar gepatroj ne aprobis ŝian fianĉon, ĉar li estis ĉino. Kiam Japanio invadis Ĉinion pro la Dua Mondmilito, ŝi aktive kontraŭis tion, per elsendoj aparte dediĉitaj al soldatoj japanaj, dirante kiom malbone ili agis kontraŭ popolo pacema, ĉina. Pro tio ŝi estis deklarita perfidulinon kontraŭ naciaj interesoj, kaj ŝia familio ricevis malagrablajn leterojn, kiuj eĉ postulis, ke ili memmortigu pro tio, ke ili havis tian filinon.

Ŝia poezio estis politika, klare, kaj elstaras libro *Flustro el uragano* (1945) kaj *En Ĉinio batalanta* (sama jaro). Ŝian tutan verkon oni povas mendi ĉe UEA libroservo.



# Je via sano, samideanoj!

Por danki vin, kiuj permesas al ni paroli per via ĵurnalo, ni proponas al vi tre bongustan koktelon (kun aŭ sen alkoholo, laŭvole): E.D.E, tio estas, Eŭropo Demokratio Esperanto.

Esperanton, kompreneble, vi tute bone konas! Pri demokratio, oni neniam havas tro...

Ĉar la Eŭropa Unio diras, ke ĝi celas, laŭ sia devizo, samtempe *unuecon kaj diversecon*, ĝi bezonas Esperanton, ankoraŭ pli urĝe ol la tuta mondo, por komuniki libere kaj ŝpareme inter egalaj eŭropaj civitanoj.

Jen tial, en Francio, ni profitis eŭropajn balotojn en 2004. Kial nur, bedaŭrinde, en Francio? Ĉar nur Germanio provis, sed ne sufiĉe frue.

Tiun (frenezan?, genian!) ideon havis Kristian Garino. Multaj francaj esperantistoj absolute rifuzis tiun proponon. Esperanta komunumo, ĉu ĉar tro persekutata, tro ofte timas novaĵojn kvazaŭ kiel *blasmefojn*: ĝi posedas mirindan idealon kaj sekvas kaj ripetas ĉiam rutinajn kutimojn. Do, ni estis nur grupetoj de kuraĝaj Donkiĥotoj sen mono, sen fortoj, sen politika sperto, sen iu ajn bonŝanco. Evidente ni ne kapablis. Tute ne eblis. Ni sciis tion. Sed..., tamen ni provis kaj ..., sukcesis fari! Jes ja!

Kiu celo? Laŭ la franca sistemo (vidu en via lando, kiel precize tio funkcias. En Germanio, ekzemple, estis tute alia organizo ol en Francio, pli favora ol la nia!) la partioj, kiuj kapablis starigi liston en minimume 5 el la 8 regionoj, rajtis havi senpage lokon, materialon, kaj eĉ specialiston por krei reklaman filmeton. Ni havis 7 listojn (nur en «France d'Outre Mer» ni ne havis sufiĉe da tempo kaj fortoj). Do junuloj kreis du filmetojn, trifoje elsenditaj per du plublikaj televidoj kaj ankaŭ radioj. Imagu la terurajn sumojn (kiom da nuloj?), se vi devintus pagi tian reklamaĵon! Tiel oni unue ni celis kaj trafis.

Sed ne nur: kvankam mono multe mankis por printi kaj disdoni sufiĉe da afiŝoj, programoj kaj voĉdoniloj, tamen voĉdonis por EDE pli ol 25 000 civitanoj. Evidente tio estas ridinda nombro por esperi deputiton —kaj tion ni sciis. Sed jen jam bela *peticio* —des pli ke multaj personoj nek ricevis politikajn programon nek trovis voĉdonilojn en balotejo; kaj ankaŭ des pli ke iaj esperantistoj, aŭ ne konsentis pri tiu iniciato, aŭ tamen preferis voĉdoni kiel kutime favore al sia preferata partio.

Precipe, la intereso vekita por Esperanto («Do, ĉu ĝi ne mortis? Bonŝance!» «Ho, kio estas tiu interesa lingvo kaj idealo?») pruvis, ke ni pravis, provante..., neeblaĵon. Kaj ni ĝojis, kiam niaj eminentuloj —kiuj antaŭe grumblis kontraŭ ni kaj rifuzis helpi— finfine honeste agnoskis, ke tiu nova agado profitis al Esperanto.

Sed Esperanto ne estas propraĵo de Francio, ĉu? La venontaj eŭropaj balotoj okazos en 2009. Ne facilas partopreni: esperantistoj ne estas spertuloj pri tio!

Tial ni ege esperas, ke en ĉiuj landoj esperantistoj kuraĝe intervenu por la komuna eŭropa bono (supre pravaj kutimaj politikaj preferoj, dekstruloj aŭ maldekstruloj, ktp).

Atentu, ke oni devas tien vigle klopodi, do ne malfrui kaj tuj serĉi informojn: unue kiel en via lando organiziĝas eŭropaj balotoj? Poste, depende el tio, sin mem plej eble efike organizi.

Ni ne havas ĝeneralan programon, jes ja. Estas 785 eŭropaj deputitoj. Se ĉiu el ili, ĉiufoje post 5 jaroj, kapablus alporti nur unu mirindan solvon al grava problemo de nia Eŭropa Unio, ĉi-tiuj mirakle progresus! Esperantistoj estas fakuloj pri lingvaj homaj rajtoj. Kuraĝon! Ne lasu nin solaj! Justa Eŭropa Unio bezonas ĉiujn. Urĝas! «Kredu nin, gesamideanoj!» Ni spertis...

*Michéle Abada-Simon,*
*membro de EDE*

Por kontakti «Eŭropo Demokratio Esperanto»:

**EDE**
**6, Rue des Juifs,**
**FR-67000 Strasbourg**
**kontakto@e-d-e.org**
**www.e-d-e.org**

# Plilongigi vivon
## per artefaritaj rimedoj

Antaŭ nelonge mi diskutis pri eŭtanazio kun amikino, kiu serioze asertis al mi, ke ŝi jam subskribis *vivan testamenton* (testamento vital, hispane). Laŭ ĝi, ŝi petas, ke kian ŝi ne plu kapablos vivi *kun digneco*, tio estas, kun *certa* vivokvalito, oni ne permesu, ke ŝi pluvivos danke al maŝinoj, per *artefaritaj rimedoj*.

Tio estas, aliflanke, la temo de nova leĝo, kiun la socialisma registaro de Hispanio deziras, ke la Parlamento aprobu en la proksima estonteco. Laŭ ĝi, ni homoj kiuj aĝas en Hispanio rajtas, oni zorgu, ke ni havu *dignan morton*. Estas nur malgranda paŝo al tio, ke se simpla malkonekto al vivmaŝinoj ne provizas tiun morton, oni rekte *premos* nin por *digna morto*pere de veneninjekcio, kvazaŭ ni estu hundoj, kiujn neniu volas. Se oni mem petas tion, ne mi obĵetos al tio, sed la problemo ekas tiam, kiam oni ne plu povas paroli aŭ movi, kaj, sekve, familiano aŭ doktoro, aŭ eĉ simpla flegisto, povas subskribi peton *por bona morto* por homo, kiu suferas.

Ĉar mi ne defendas bonan morton, sed bonan vivon, mi ne povas konsenti kun tiu nocio, eŭtanazio. Ĉar mi opinias, ke morto povas neniam esti bona, ĉar bona estas ĉiam vivo.

Mi memoras tiun epokon, kiam mi estis kvinjaraĝa. Mia korpo bone funkciis; mi estis forta, fleksebla, kun tuta mondo ekkoni. Dudek jarojn poste, mi estis en apogeo mia: plej forta, plej bonfarta, plej iluziplena. Oni diru, ke mi tiam vivis *bonan, dignan vivon*. Nun, tridek jarojn poste, mi ne plu vidas tiom bone, mi laciĝas multe pli frue, mia sano estas multe malpli bona. Mia vivkvalito, ni diru, estas nur 50% ol tiu, kiun mi ĝuis antaŭ tridek jaroj. Ĉu mi, sekve, devas nun memmortiĝi? Mi ankoraŭ povas vojaĝi, legi, amindumi, revi, havi plezuron..., ĝui duonebone kvalitan vivon. Sed mia korpo difektiĝas pli kaj pli. Mi sentas doloron pli kaj pli ofte. Mi povos atingi neelteneblan staton aŭ alkutimiĝi al malpli bonaj sankondiĉoj.

Sed bonfarta heredonto mia povas, en la estonto, kompati al mia difektita sanestato. Se mi senkonsciiĝas, li aŭ ŝi povas, en la estonto, laŭleĝe peti *dignan morton* por mi. Mi tion ne deziras.


Mi rezonis al mia amikino, ke eĉ ŝi, en sia relativa junaĝo, devas engluti pilolon tagan kontroli sian sangocirkuladon. Mi demandis ŝin, ĉu tiu pilolo estas *artefarita rimedo*, kaj ŝi kolere respondis al mi vive, ke pilolo *ne estas maŝino, kiel artefarita pulmo, aŭ reno!* Mi ne komprenas, ke pilolo povas donaci *normalan vivon*, sed ne meĥanika pulmo aŭ reno... Ambaŭ permesas, ke ni reiru en nian *normalan vivon*, kion ajn tio signifu...

Sed la nomo mem *bona morto* kaŝas maleŭfemisman mortigon, laŭ mi, eĉ se tio ne estas tiel komprenata hodiaŭ. Ni defendu bonan vivon, la plej bonan vivon kiun ni povas havi en ĉiu momento, ĉar kiel saĝa Bertrand Rasel notigis iam, *ni konsideru la alternativon.* Kaj alternativo nura al ĉiaspeckvalita vivo estas morto. Fia morto. Morto, kiu nur komfortigas eble al tiu, kiu kredas, ke estas vivo post la morto. Tamen, kiu povas tion pruvi? Oni ĝuu vivon, ĉian vivon, dum ĝi daŭros **sen permeso de la registaro**.

# Ĝusep' Ĵuis'

Pardonpetas mi al katalunoj, kiuj legas tion ĉi, ĉar mi konas nenion pri la kataluna lingvo aŭ ties prononcmaniero. Mi havas nenian kialon lerni ĝin, kaj ankaŭ neniun bezonon fari tion. Se mi estus tiom malbonŝanca devi vivi en Katalunio, mi havus la bezonon, kaj se estus io alloga en tiu kulturo por mi, certe mi lernintus ĝin nun, same kiel mi iam lernis Esperanton, ĉar la penso sub ĝi multe allogis min. Sed mi ne povas ne pensi, ke la suba penso al kataluneco estas sendependiĝo el Hispanio, la lando kiu nutris Katalunion dum mil jaroj aŭ pli. Aldone al la perforto, kaj malestimeco, kiujn mi vidis en miaj debatoj kun katalunoj: aŭ vi apogas ilin, aŭ vi estas malamiko de katalunoj.

Sed evitu mi hodiaŭ konfronton al naciistoj, se okazas, ke li aŭ ŝi legas min nun. La afero, kiu instigis tiun ĉi pripenson estas incidento, kiu okazis antaŭ kelkaj tagoj, dum televida programo ***Mi havas demandon por vi.*** La demandato estis Jozefo Ludoviko Karod' Rovira, sendependentista deputito en hispana institucio, eĉ se ĝi nomiĝas *Kataluna* Parlamento. Demandonto komencis la demandon per *Sinjoro Jozefo Ludoviko* (Jose Luis, en la hispana), kaj li interrompis vive, dirante, *Pardonu, sinjoro, sed mi nomiĝas Ĝuzep' Ĵuis'* (supozas mi, ke mi transkribis bone tion, kion mi aŭdis), *kaj vi havas neniun rajton ŝanĝi mian nomon!* Li eĉ ne akceptis, ke la demandonto ne regis la katalunan**.**



Mi ne povis ne rememori tiun okazon, dum la berlina kongreso, kie madagaskara esperantistino koleris pro tio, ke ni ne bone prononcis ŝian nomon, eĉ se ni intencis diri ĝin ŝiaetnolingve..., tamen, neniel sukcese. Ŝi nomiĝis Hmlce, aŭ io simile.

Homoj forgesas ofte, aŭ agas kvazaŭ ili ne scias, ke nomoj estas vortoj por voki homojn, aŭ priskribi bestoj kaj aliaj estaĵoj. Pretendi igi ilin standardon pri sia persona nekontenteco estas, se oni devas paroli ĝentile, stulte. Neniu homo estas sia nomo, kaj nomo ne povas enhavi tutan homon. Sed konfliktigaj homoj ĉiam sukcesas en mondo, kie ŝafoj superabundas. Jose Luis Perez Rovira ja scias tion, sed li senhonte postulas stultaĵon, ĉar sukcese postuli sensencaĵon estas pruvo de povo.

Rezoneblaj homoj devas eviti konflikton, certe, sed ne je ĉiu kosto. Hispanio povas vivi sen Katalunio, kaj ambaŭ povas vivi sen homoj kiel tiu politikisto, kies salajro pagas, ŝajne, Hispanio.

# La faraono.

## *Ĉapitro 20ª (fino).*

—Mi estis la tutan nokton— respondis la servisto —sur la placo, kie estas la templo de Set. Ĉirkaŭ la deka horo vespere el la ĝardeno, kiu estas dek domojn de tie, eliris tri pastroj. Unu el ili, kun nigraj haroj kaj barbo, direktis siajn paŝojn tra la placo, al la templo de Set. Mi kuris post li, sed komencis fali nebulo kaj li malaperis de miaj okuloj. Ĉu li revenis al la «Verda Stelo» kaj kiam —mi ne scias. -

La mastro, aŭskultinte la raporton, ekfrapis sian frunton kaj komencis murmureti al si:

—Do mia Harrano, se li surmetas pastran kostumon kaj vizitas templojn, devas esti pastro; kaj se li portas barbon kaj harojn, devas esti ĥaldea pastro. Kaj se li sekrete kunvenas kun ĉi tieaj pastroj, estas en tio ia friponaĵo. Mi ne diros pri tio al la polico, ĉar tio povus esti danĝera por mi mem. Sed mi informos iun el la grandaj Sidonanoj, ĉar en tio eble estas bona afero, se ne por mi, almenaŭ por la niaj.

Baldaŭ venis la alia sendito. Ankaŭ kun li Asarhadon iris en la kelon kaj ricevis la sekvantan raporton:

—La tutan nokton mi staris antaŭ la domo «Sub Verda Stelo». La Harranano estis tie, ebriiĝis kaj faris tian bruon, ke la policisto admonis la pordiston.

—Kio?..— demandis la mastro. —La Harranano estis la tutan nokton en la drinkejo «Sub Verda Stelo» kaj vi vidis lin?...

—Ne sole mi, sed ankaŭ la policisto... Asarhadon venigis la unuan serviston kaj al ĉiu ordonis ripeti lian rakonton. Ili ripetis fidele ĉiu la sian. Do Phut la tutan nokton amuziĝis en la drinkejo «Sub Verda Stelo», ne forlasante ĝin eĉ por unu minuto, kaj samtempe malfrue vespere iris al la templo de Set, de kiu li ne revenis!

— Oh!...— murmuris la Feniciano —en ĉio ĉi sin kaŝas ia granda friponaĵo... Mi devas plej baldaŭ konigi al la estroj de la fenicia komunumo, ke ĉi tiu ĥeto scias esti samtempe en du lokoj. Mi petos lin iri for el mia gastejo... Mi ne amas tiujn, kiuj havas du vizaĝojn: unu propran, kaj alian provizan. Ĉar tia homo estas aŭ ŝtelisto, aŭ sorĉisto, aŭ konspiranto.

Ĉar Asarhadon timis tiajn aferojn, li forpelis la sorĉojn per preĝoj al ĉiuj dioj, kiuj ornamis lian drinkejon. Poste li kuris en la urbon, kie li konigis la fakton al la estro de la fenicia komunumo kaj al la estro de la ŝtelistoj. Reveninte hejmen li alvokis la polican dekestron kaj diris al li, ke Phut povas esti danĝera homo. Fine li postulis de la Harranano, ke li forlasu la gastejon, ĉar lia ĉeesto alportas neniun profiton, sed nur suspektojn kaj perdojn.

Phut volonte konsentis kaj diris al la mastro, ke li forveturas Tebojn vespere.

—Neniam revenu vi de tie!...— pensis la gastama mastro. —Putru en la minejoj aŭ falu en riveron, kiel nutraĵo por la krokodiloj!

## Ĉapitro 21ª.

La vojaĝo de la kronprinco komenciĝis en la plej bela sezono de l' jaro, en la monato Famenut (fino de decembro, komenco de januaro).

La akvo malleviĝis je duono, malkovrante novajn kaj novajn terajn pecojn. De Teboj veturis al la maro multenombraj flosoj kun la tritiko; en Malsupra Egipto oni rikoltis la trifolion kaj seneson. La oranĝaj kaj granataj arboj estis kovritaj de floroj, kaj sur la kampoj oni semis la linon, hordeon, fabon, fazeolon, kukumojn kaj aliajn legomojn.

Kondukita al la memfisa haveno de la pastroj, plej altaj ŝtataj oficistoj, gvardio de lia sankteco kaj popolamasoj, la kronprinco Ramzes eniris en oritan barkon, ĉirkaŭ la deka horo matene. Sub la ferdeko, sur kiu estis multekostaj tendoj, remis dudek soldatoj; ĉe la masto kaj sur ambaŭ ekstremoj de la barko okupis lokojn plej bonaj riveraj inĝenieroj. Unuj zorgis pri la veloj, aliaj komandis la remistojn, ceteraj direktis la ŝipon.

Ramzes invitis la plej respektindan ĉefepiskopon Mefreson kaj la sanktan patron Mentezufison, kiuj devis akompani lin en la vojaĝo kaj en la estrado. Li alvokis ankaŭ la nomarĥon de Memfiso, kiu devis konduki la princon ĝis la limoj de sia provinco.



Kelkcenton da paŝoj antaŭ la vic-reĝo veturis la bela barko de Otoes, kiu estis nomarĥo de la najbara provinco Aa. Kaj post la princo sin etendis senfina vico de ŝipoj, okupataj de la korteganoj, pastroj, oficiroj kaj oficistoj.

La provizoj kaj servistoj estis jam senditaj antaŭe.

Nilo ĝis Memfiso fluas inter du montaj vicoj. Poste la montoj disiĝas al la oriento kaj okcidento, kaj la rivero dividiĝas en kelke da brakoj, kies akvoj ruliĝas al la maro tra granda ebenaĵo.

Kiam la barko forlasis la bordon, la kronprinco volis paroli kun la ĉefepiskopo Mefres. Sed en la sama momento leviĝis tia krio de la popolamaso, ke la kronprinco devis eliri el la tendo kaj sin montri al la popolo.

Sed la bruo anstataŭ malgrandiĝi kreskis senĉese. Sur ambaŭ bordoj staris pli kaj pli grandiĝantaj amasoj: duone nudaj laboristoj kaj feste vestitaj burĝoj. Multaj havis kronojn sur la kapoj, preskaŭ ĉiuj — verdajn branĉetojn en la manoj. Kelkaj grupoj kantis, en aliaj sonis tamburoj kaj flutoj.

Interrompis la laboron la gruoj, dense starantaj sur la bordoj, kaj malplenaj restis iliaj siteloj. Kontraŭe sur Nilo svarmis etaj ŝipetoj, kies remistoj ĵetis florojn al la barko de l' kronprinco. Kelkaj saltis en la akvon kaj naĝis post la princa ŝipo.

—Sed ili salutas min, kiel lian sanktecon!...— pensis la kronprinco.

Kaj granda fiero ekregis lian koron, kiam li vidis tiom da ornamitaj ŝipoj, kiujn li povis haltigi per unu gesto, kaj tiom da homoj, kiuj forlasis siajn okupojn kaj ne timis la kripliĝon, eĉ la morton, puŝataj de unu sola deziro ekrigardi lian dian vizaĝon. Ŝajnis al la princo, ke se li saltus de la ferdeko, li ne atingus la akvon, ĉar la entuziasmo de l' popolo kaptus lin kaj levus super la teron, kiel birdon.

La senĉesaj krioj de la popolo ebriigis la princon. Ĉi tiu krio plenigis lian bruston kaj kapon, levis lin tutan.

La ŝipo iom proksimiĝis al la kontraŭa bordo, la figuroj de l' amaso desegniĝis pli klare, kaj la kronprinco rimarkis ion, kion li ne atendis. Dum la unuaj vicoj aplaŭdis kaj kantis, en la pli malproksimaj oni povis vidi bastonojn, kiuj dense kaj rapide falis sur nevideblajn dorsojn.

La mirigita kronprinco sin turnis al la nomarĥo de Memfiso:

—Ekrigardu via nobleco... Tie laboras bastonoj?...

La nomarĥo ŝirmis la okulojn per la mano; lia kolo ruĝiĝis...

—Pardonu, via ekscelenco, sed mi ne bone vidas...

—Oni bastonas, certe oni bastonas— ripetis la princo.

—Tio estas ebla— respondis la nomarĥo. —Kredeble la polico kaptis bandon da ŝtelistoj...

Ne tre kontentigita, la kronprinco iris al la fino de l' ŝipo inter la inĝenierojn, kaj de tiu punkto rigardis al Memfiso.

Supre, la bordoj de Nilo estis preskaŭ malplenaj, la ŝipetoj malaperis, la gruoj, ĉerpantaj akvon, laboris, kvazaŭ nenio estus okazinta.

—Ĉu la soleno jam estas finita?...— demandis la princo inĝenieron, montrante la supron de l' rivero.

—Jes... la homoj revenas al la laboro— respondis la inĝeniero.

—Tre rapide!...

—Ili devas retrovi la perditan tempon— respondis la inĝeniero nesingarde.

La kronprinco ektremis kaj fikse rigardis la parolanton. Sed tuj li trankviliĝis kaj revenis sub la tendon. La aklamoj ne interesis lin plu. Li estis malgaja kaj silenta. Post la eksplodo de la fiero li sentis malestimon al la amaso, kiu tiel rapide transiras de l' entuziasmo al la gruoj, ĉerpantaj koton.

En ĉi tiu loko Nilo komencas dividiĝi en brakojn. La ŝipo de l' nomarĥo de Aa sin turnis al la okcidento kaj post unuhora veturado atingis la bordon. La popolamasoj estis ankoraŭ pli multenombraj, ol apud Memfiso. Oni starigis multe da kolonoj kun standardoj kaj triumfajn pordegojn, ornamitajn per verdaĵo. Inter

la popolo pli ofte oni povis renkonti fremdajn vizaĝojn kaj vestojn.


Kiam la princo eliris sur la teron, proksimiĝis pastroj kun baldakeno, kaj la nomarĥo Otoes diris al li:

—Saluton al vi, vic-reĝo, en la limoj de la nomeso Aa! Kiel signon de via favoro, kiu estas por ni kiel la ĉiela roso, volu doni oferon al la dio Ptah, kiu estas nia patrono, kaj akceptu sub vian protekton ĉi tiun nomeson kun ĝiaj temploj, oficistoj, popolo, brutaro, greno kaj ĉio, kio estas ĉi tie.

Poste li prezentis al li grupon de junaj elegantuloj, parfumitaj, kolorigitaj, en vestoj, broditaj per oro.

Ramzes atente rigardis ilin.

—Ah!...— ekkriis li —ŝajnis al mi, ke io mankas al ĉi tiuj sinjoroj, kaj nun mi vidas. Ili ne havas perukojn...



Granda Halo de Karnak'

—Ĉar vi, nobla princo, ne portas perukon, nia junularo ĵure promesis ne uzi plu ĉi tiun ornamon— respondis la nomarĥo.

Post ĉi tiu klarigo unu el la junuloj stariĝis post la princo kun ventumilo, dua kun ŝildo, tria kun lanco, kaj komenciĝis solena irado. La kronprinco iris sub baldakeno, antaŭ li pastro bruliganta incensojn kaj kelke da junaj knabinoj, ĵetantaj florojn sur la vojeton, sur kiu estis ironta la kronprinco.

La popolo, en festaj vestoj, kun branĉetoj en la manoj, formis spaliron kaj kriis, kantis aŭ falis teren antaŭ la kronprinco. Sed Ramzes rimarkis, ke malgraŭ la laŭta ĝojo, la vizaĝoj estis rigidaj kaj maltrankvilaj. Li rimarkis ankaŭ, ke la amaso estas dividita en grupojn, kiujn direktas iaj homoj, kaj ke oni ĝojas laŭ komando. Kaj ree li eksentis en la koro malestimon al la popolaĉo, kiu ne scias eĉ ĝoji.

Malrapide oni proksimiĝis al la kolono, kiu apartigis la nomeson Aa de la memfisa nomeso. Sur la kolono de tri flankoj estis surskriboj pri la grandeco, loĝantaro kaj urboj de l' provinco; de la kvara flanko staris statuo de la dio Ptah, vindita de l' piedoj ĝis la brusto, en ordinara kufo sur la kapo, kun bastono en la mano.

Unu el la pastroj donis al la princo oran kuleron kun brulanta incenso. La kronprinco, dirante la konvenajn preĝojn, levis la kuleron ĝis la alto de l' dia vizaĝo kaj kelkfoje profunde sin klinis.

La krioj de l' popolo kaj pastroj plilaŭtiĝis, kvankam inter la aristokrataj junuloj oni povis rimarki ridetojn kaj mokojn. La princo, kiu de l' tempo de la paciĝo kun Herhor montris grandan respekton al la dioj kaj pastroj, iom sulkigis la brovojn, kaj tuj la junuloj ŝanĝis la sintenadon. Ĉiuj fariĝis seriozaj, kelkaj falis teren antaŭ la kolono.

—Vere!— pensis la princo —la homoj de nobela deveno estas pli bonaj, ol ĉi tiu popolaĉo... Kion ajn ili faras, ili faras kore, ne kiel tiuj, kiuj kriante por mia honoro, dezirus plej baldaŭ reveni al siaj staloj kaj stabloj....

Nun pli bone ol iam li vidis la interspacon, kiu ekzistis inter li kaj la simpluloj. Kaj li komprenis, ke nur la aristokratio estas klaso, kun kiu lin ligas la komuneco de l' sentoj. Se subite malaperus ĉi tiuj elegantaj junuloj kaj belaj virinoj, kies brulantaj rigardoj observas ĉiun lian movon por tuj servi lin kaj plenumi la ordonojn, se ili malaperus, la princo en la sennombra amaso sin sentus pli sola, ol en la dezerto.

Dek Negroj alportis portilon, kies baldakeno estis ornamita per strutaj plumoj, kaj la princo sidiĝis en ĝin kaj foriris en la ĉefurbon de la nomeso Sohem; kie li ekloĝis en la registara palaco.

La ĉeesto de Ramzes en ĉi tiu provinco, nur kelke da mejloj de Memfiso, daŭris unu monaton. La tuta tempo pasis en akceptado de petantoj kaj de honoraj vizitoj, en prezentado de oficistoj kaj en festenoj.

La festenoj estis duoblaj: unuj en la palaco, en kiuj partoprenis nur la aristokratio, la aliaj —sur la ekstera korto, kie oni rostis tutajn bovojn, manĝis centojn da panoj kaj trinkis riverojn da biero. Tie sin regalis la princaj servistoj kaj la malaltaj oficistoj de l' nomeso.

Ramzes admiris la malavarecon de l' nomarĥo kaj la amon de l' grandaj sinjoroj, kiuj tage kaj nokte ĉirkaŭis la vic-reĝon, atentaj al ĉiu lia gesto kaj pretaj plenumi liajn ordonojn.

Fine laca de la plezuroj, Ramzes diris al la nobla Otoes, ke li volas ekkoni de proksime la administradon de l' provinco, ĉar tian ordonon li ricevis de lia sankteco.

Lia deziro estis plenumita. La nomarĥo petis la princon, ke li eniru en portilon, portatan nur de du homoj, kaj kun granda sekvantaro kondukis lin al la templo de l' dio Hator. Tie la sekvantaro restis en la vestiblo, kaj la nomarĥo ordonis porti la princon sur la supron de unu el la pilonoj kaj li mem akompanis lin.

De la supro de la sesetaĝa turo, de kie la pastroj observadis la ĉielon kaj per diverskoloraj standardoj komunikiĝis kun la najbaraj temploj, en Memfiso, Athribis kaj Anu, la rigardo ĉirkaŭprenis en kelkmejla radio preskaŭ la tutan provincon.

De ĉi tiu loko Otoes montris al la princo: kie kuŝas la kampoj kaj vinberejoj de l' faraono, kiun kanalon oni purigas nun, kiun akvobaron oni rebonigas, kie estas la reĝaj grenejoj, kie marĉoj kovritaj de lotusoj kaj papirusoj, kiuj kampoj estas superŝutitaj de sablo, k. c.

Ramzes estis ravita de la bela vidaĵo kaj varmege dankis Otoeson pro la plezuro.

Sed kiam li revenis en la palacon kaj laŭ la konsilo de l' patro komencis noti la impresojn, li konvinkiĝis, ke liaj scioj pri la ekonomia stato de l' nomeso Aa ne plivastiĝis.

Post kelke da tagoj li ree postulis klarigojn de Otoes pri la administrado de l' provinco. Tiam la nomarĥo ordonis al ĉiuj oficistoj kunveni kaj preteriri antaŭ la princo, kiu sidis sur alte lokita seĝo.

Tiel pasis antaŭ la vic-reĝo grandaj kaj malgrandaj trezoristoj, skribistoj de greno, vino, brutaro kaj teksaĵoj, estroj de masonistoj kaj fosistoj, teraj kaj maraj inĝenieroj, kuracistoj de diversaj malsanoj, oficiroj de l' laboristaj regimentoj, policaj skribistoj, juĝistoj, gardistoj de malliberejoj, eĉ paraŝitoj kaj ekzekutistoj. Post ili la nomarĥo prezentis al Ramzes liajn proprajn oficistojn en ĉi tiu provinco. La princo kun nemalgranda miro eksciis, ke en la nomeso Aa kaj en la urbo Sohem li posedas: personan koĉeron, arkpafiston, pordiston de ŝildo, lanco kaj hakilo, dekkelkon da portilistoj, kelke da kuiristoj, perukistoj kaj aliaj servistoj, plene fidelaj al li, kvankam Ramzes tute ne konis ilin, eĉ ne aŭdis iam iliajn nomojn.

Lacigita kaj enuigita de la senfrukta parado de la oficistoj, la princo perdis la kuraĝon. Teruris lin la penso, ke li komprenas nenion, ke li ne estas do kapabla administri la ŝtaton. Sed li timis konfesi tion eĉ al si mem.

Ĉar se li ne scias regi Egipton, kaj la aliaj tion rimarkos, kio restos al li?... Nur la morto. Ramzes sentis, ke ekster la trono ne ekzistas por li feliĉo, ke sen povo li ne povus vivi.

Sed post kelktaga ripozo, se eble estas ripozi en la ĥaoso de la kortega vivo, li ree alvokis al si Otoeson kaj diris al li:

—Mi petis, ke via ekscelenco malkovru al mi la sekretojn de l' administrado de via provinco. Vi faris tiel: vi montris al mi la landon kaj la oficistojn, sed mi —mi scias ankoraŭ nenion. Kontraŭe, mi estas kiel homo en la subteraj galerioj de niaj temploj, kiu vidas ĉirkaŭ si tiom da vojoj, ke fine li tute ne povas eliri.

La nomarĥo ekmeditis.

—Kion mi devas fari?...— ekkriis li. —Kion vi postulas de mi, monarĥo?... Diru unu solan vorton, kaj mi redonos al vi mian oficon, riĉaĵon, eĉ kapon.

Kaj vidante, ke la princo favore akceptas liajn certigojn, li daŭrigis: —Dum la vojaĝo vi vidis la popolon de ĉi tiu nomeso. Vi diros, ke ne ĉiuj estis tie; vi estas prava. Mi ordonos, ke venu la tuta loĝantaro, kaj ili estas: viroj, virinoj, maljunuloj kaj infanoj —ĉirkaŭ ducent mil. Vi bonvolis rigardi nian teritorion de l' supro de la pilono. Sed se vi deziras, vi povas viziti ĉiun kampon, ĉiun vilaĝon kaj ĉiun straton de l' urbo Bohem.

Fine mi montris al vi la oficistojn, inter kiuj, estas vere, mankis la plej malaltaj. Sed diru unu vorton, kaj morgaŭ aperos ĉiuj kaj kuŝos sur la ventroj antaŭ via ekscelenco.

—Kion mi devas fari?... respondu, plej glora sinjoro!...

—Mi kredas al vi, ke vi estas tre fidela respondis la princo. —Klarigu do al mi du aferojn: unue —kial malgrandiĝis la

enspezoj de lia sankteco? Due —kion vi mem faras en la nomeso?...

Maltrankvilo ekregis Otoeson, kaj la princo tuj aldonis:

—Mi volas scii, kion vi faras ĉi tie kaj kiel vi administras, ĉar mi estas ankoraŭ juna kaj nur komencas la regadon.

—Sed vi havas la saĝon de centjara maljunulo!...— murmuretis la nomarĥo.

—Konvenas do al mi demandi la spertajn, kaj al vi instrui min.

—Mi ĉion montros al vi kaj rakontos— diris Otoes. —Sed ni devas iri en lokon, kie ne regas tia tumulto...

Efektive, en la palaco, kiun okupis la princo, sur la eksteraj kaj internaj kortoj, svarmis multego da homoj, kvazaŭ en foiro. Ili manĝis, trinkis, kantis, vete batalis aŭ kuris, kaj ĉio ĉi por la honoro de l' vicreĝo, kies servistoj ili estis.

Ĉirkaŭ la tria horo, post la tagmezo la nomarĥo ordonis elkonduki du ĉevalojn, sur kiuj ili kun la princo elrajdis el la urbo okcidenten. Kaj la korteganoj restis en la palaco kaj amuziĝis ankoraŭ pli gaje.

La tago estis bela, malvarmeta, la tero estis kovrita de verdaĵo kaj floroj. Super la kapoj de l' rajdantoj kantis birdoj, la aero estis plena de bonodoro.

—Kiel agrable estas ĉi tie!...— ekkriis Ramzes. —De unu monato unuafoje mi povas kolekti la pensojn. Mi jam komencis kredi, ke en mia kapo ekloĝis tuta regimento de militaj veturiloj kaj faras ekzercojn de la mateno ĝis la nokto.

—Tia estas la sorto de la potenculoj de l' mondo —respondis la nomarĥo.

Ili haltis sur monteto. Ĉe iliaj piedoj sin etendis grandega herbejo, distranĉita de blua rivereto. Norde kaj sude oni vidis blankajn murojn de urbetoj; post la herbejo, ĝis la limoj de l' horizonto brilis la ruĝaj sabloj de la okcidenta dezerto, de kie iafoje blovis la spiro de varmega vento, kvazaŭ el forno.

Sur la herbejo sin paŝtis sennombraj aroj de hejmaj bestoj: bovoj senkornaj kaj kornaj, ŝafinoj, kaprinoj, azenoj, antilopoj, eĉ rinoceroj. Tie ĉi kaj tie oni vidis marĉojn, kovritajn de akvaj kreskaĵoj kaj arbetoj, inter kiuj amase flugis sovaĝaj anseroj, anasoj, kolomboj, cikonioj, ibisoj kaj pelikanoj.

—Ekrigardu, sinjoro —diris la nomarĥo — jen estas la bildo de nia lando Queneh, de Egipto. Oziriso amis ĉi tiun teran strion inter la dezertoj, superŝutis ĝin per kreskaĵoj kaj bestoj por havi utilon de ili. Poste la bona dio prenis homan figuron kaj estis la unua faraono. Kaj kiam li eksentis, ke lia koro velkas, li forlasis lin kaj transiris en la koron de sia filo, kaj poste en la filon de la filo.

Tiamaniere Oziriso vivas inter ni de jarcentoj, kiel faraono, kaj havas profiton de Egipto kaj de ĝiaj riĉaĵoj, kiujn li mem kreis. Li disetendis siajn branĉojn, kiel potenca arbo. Liaj radikoj estas ĉiuj egiptaj reĝoj, liaj branĉoj —la nomarĥoj kaj pastroj, liaj branĉetoj —la militistoj. La videbla dio sidas sur la tera trono kaj prave ricevas la profiton de la lando; la nevidebla akceptas oferojn en la temploj kaj per la buŝo de l' pastroj anoncas sian volon.

—Vi diras la veron —interrompis la princo.

—Tiel estas skribite.

—Ĉar la Oziriso-faraono ne povas mem administri sian surteran mastraĵon, li do ordonas zorgi pri ĝi al ni, nomarĥoj, kiuj devenas de lia sango.

—Tio estas vera —diris Ramzes. —Eĉ iafoje la suna dio transiras en la korpon de nomarĥo kaj donas la komencon al nova dinastio. Tiel naskiĝis la dinastio memfisa, elefantina, teba, ksoita...

—Vi diris, sinjoro —daŭrigis Otoes. —Kaj nun mi respondos vian demandon: Vi demandis: kion mi faras en la nomeso?... Mi gardas la riĉaĵon de Oziriso-faraono kaj mian parton en ĝi. Rigardu ĉi tiujn arojn: vi vidas diversajn bestojn. Unuj liveras lakton, aliaj viandon, aliaj lanon kaj felojn. Same la loĝantaro de Egipto: unuj liveras grenon, aliaj vinon, teksaĵojn, meblojn, konstruaĵojn. Kaj mia afero estas preni de ĉiu, kion li ŝuldas kaj meti antaŭ la piedoj de l' faraono.

Mi ne povus mem gardi tiel multenombrajn brutarojn kaj tial mi elektis viglajn hundojn kaj saĝajn paŝtistojn: Unuj melkas la brutojn, tondas kaj ŝiras de ili la haŭtojn; aliaj gardas, ke oni ne ŝtelu ilin aŭ ke rabobestoj ilin ne disŝiru. Same en la nomeso: mi ne povus mem kolekti ĉiujn impostojn kaj gardi la tutan loĝantaron, mi do havas oficistojn, kiuj faras ĉion ĉi kaj al mi prezentas raportojn pri sia agado.

—Ĉio ĉi estas vera— interrompis la princo —mi tion scias kaj komprenas. Sed mi ne povas malkovri, kial malgrandiĝis la enspezoj de lia sankteco, se oni tiel zorge gardas ilin?


—Bonvolu rememori— respondis la nomarĥo —ke la dio Set, kvankam li estas la vera frato de la suna Oziriso, malamas lin, batalas kontraŭ li kaj malbonigas ĉiujn liajn verkojn: Li sendas mortajn malsanojn al la homoj kaj bestoj, li faras, ke la leviĝo de Nilo estas tro malgranda aŭ tro rapida, li en la varmega sezono ĵetas sur Egipton polvajn nebulojn.

Kiam la jaro estas bona, Nilo atingas la dezerton, kiam ĝi estas malbona —la dezerto venas al Nilo, kaj tiam la reĝaj enspezoj devas esti pli malgrandaj. Rigardu, via ekscelenco— finis li, montrante la herbejojn. —Multenombraj estas la brutaroj, sed dum mia juneco ili estis pli multenombraj. Kaj kiu estas kulpa? Neniu alia, ol Set, al kiu ne povas kontraŭstari la homaj fortoj. Ĉi tiu herbejo, hodiaŭ granda, estis iam ankoraŭ pli granda, kaj de ĉi tiu loko oni ne povis vidi la dezerton, kiu teruras nin hodiaŭ. Kie batalas la dioj, la homo estas senforta; kie Set venkas Ozirison, kiu povas bari al li la vojon?

La respektinda Otoes finis; Ramzes mallevis la kapon. Ne malmulte li aŭdis en la lernejoj pri la favoroj de Oziriso kaj pri la maljustaĵoj de Set, kaj kiam li estis ankoraŭ infano, li koleris, ke oni ne reguligis definitive la kontojn kun Set.

—Kiam mi estos granda— pensis li tiam —kaj mi povos porti lancon, mi trovos Seton kaj ni provos niajn fortojn!...

Kaj jen hodiaŭ li rigardis la senlimajn sablojn, la regnon de la malbona dio, kiu malgrandigis la enspezojn de Egipto; sed li ne pensis pri batalo kontraŭ li. Ĉar kiel batali kontraŭ la dezerto?... Oni povas nur evitadi ĝin, aŭ perei en ĝi.



# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**


REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO**

Tfn° (00 34) 615 427 143

**Retskribu al jesuo@ono.com**


http://www.gazetoteko.eu/kajeroj/k75.html

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k75.html





Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460